

AVENO #47 - Homaj Rajtoj kaj Respondecoj – 2021

Ghenerala rimarko: pluraj informoj alvenas kun peticio - kompreneble plej multaj el ili ne plu estas aktivaj. Do, bonvolu kontroli la daton, se vi intencas subskribi ian ajn peticion.

Se vi serchas ion chi-sube: kutime mi uzas la literumadon pere de „h“: ch, ... sh + u. Ligoj:

Socio de Verduloj Esperantistaj (AVE): www.verduloj.org , novaj artikoloj je la enirpagho, aliaj sub "Dokumentoj"

Homaj Rajtoj (1947): eo.wikipedia.org/wiki/Universala_Deklaracio_de_Homaj_Rajtoj

Lingvaj Rajtoj = Homaj Rajtoj: www.linguistic-rights.org/

Tutmondaj Mondcivitanaj Teritorioj: www.recim.org/dem/tcm-list.htm

Rajto de memdetermino: eo.wikipedia.org/wiki/Rajto_de_memdetermino

Homaj Respondecoj (1997):

eo.wikipedia.org/wiki/Universala_Deklaracio_de_Homaj_Respondecoj

la dokumento en la angla, kiu ligas al tradukoj en ch. 40 lingvoj:

www.interactioncouncil.org/publications/universal-declaration-human-responsibilities

= = =

2022-01 Rusio kaj najbaroj kaj NATO por paca kunekzistado

al mia lasta mesagho venis kaj kelkaj aproboj kaj kritikaj komentoj.

Pri la rusaj minoritatoj: SU intence en-plantis etnajn rusojn en la konkeritajn (al-igitajn) shtatojn; en Estonio kaj Latvio ili devus havi minoritatan rajton pri la rusa lingvo; de Latvio dum multaj jaroj sidas Tatjana Shdanoka en la frakcio de Verdaj Partioj, kiu defendas ilin en la EP.

Pri agresemo de Okcidento kaj de Rusio: „fakte Ruslando neniam atakis okcidenteŭropon“

Fakte SU, en kiu Rusio havis la gvidan rolon lau la Hitler-Stalin-Kontrakto, tuj post la agreso de Nazi-Germanio al Pollando (1939-09-01), aneksis orientan Pollandon, a baltiajn shtatojn kaj Finnlandon. Oni povas diskuti chu tiuj apartenas al "okcidenta" Europo - mi supozas ke jes - se oni difinas „Okcidenton“ kiel malferma socio kun separitaj sendependaj potencoj (legislativo, ekzekutivo, leghdono - kaj ankau jhurnalismo kaj sendependaj civitanoa organizoj. Finnlandigho signifas (lau vikipedio): „ ke pli potenca ŝtato influas aferojn en malpli potenca najbara ŝtato“. Tion nuntempe faras Rusio en Donbas kaj Luhansk - kaj jam aneksis Krimeon.

Pri la temo garantio kaj paca kunekzistado:

Chiukaze ekzistas skribita Memorandum de Budapesto, 1994, kiu "garantias" la limojn; kiujn Putin delonge tushas (Kartvelio, Donbass, Krimeo).

Jen la diversaj dokumentoj - kunvenoj (angla versio, simple elektu pagharon en via lingvo):

https://en.wikipedia.org/wiki/Budapest_Memorandum_on_Security_Assurances

https://en.wikipedia.org/wiki/Sinatra_Doctrine

https://en.wikipedia.org/wiki/Malta_Summit

Chu NATO „ante portas“ minacas Rusion ?

Mi dirus: ne, char neniu flanke de nunaj kaj eble estontaj NATO-shtatoj havas ideologion* konkeri rusian terenon.

Fakte la novaj super-rapidaj rakedoj de Rusio (kiuj supozeble trovighas en la regiono de Kaliningrado ?) povas atingi same rapide plurajn grandajn chefurbojn de NATO-shtatoj (Varsovio, Vieno, Berlino, Bruselo, Londono, Parizo, Kopenhago ktp.), kiel tiuj rakedoj de NATO povus atingi Moskvon, ktp.. Estus homar-minaca frenezajho komenci tian nuklean militon.

*) Jes, ideologoj kiel Napoleon kaj Hitler (kaj kunuloj) havis tian ideologion. NATO de si mem ne estas agresema; do, la aliaj NATO-shtatoj haltigus tiajn ideojn.

Mi esperas ke eblas kunsidi je Ronda Tablo organizita de OSKE kaj trovi denove pacan kunekzistadon inter Rusio kun siaj najbaroj kaj pli okcidentaj kvazau-najbaroj. Ekonomia kunlaboro estas delonge bazo de paco.

= =

2021-12-23 La ruza prezidento Putin parolis al sia popolo - postulas garantiojn de okcidento, sed

ne pretas doni garantiojn al najbaraj landoj.

La nombro da ĵurnalistoj estis mal pli alta ol kutime; tiel eblis facile ekskludi „Novaja Gazeta“, la sola sendependa gazeto en Rusio.

Jen la komento de germana ĵurnalista kiu delonge raportas pri meza kaj orienta Europo:

<https://www.deutschlandfunk.de/jahrespressekonferenz-des-russischen-praesidenten-putin-dlf-acbd52e9-100.html>

Jen la ligilo al la konferenco dum 4 horoj - fakte tiu nova rusa amasmedio ghis nun ne estis alighita en Germanio ??

Kaj Putin ne sekvis la ggentilecon de reghoj - alveni akurate, la ĵurnalistoj devis atendi pli ol 10 minutoj. (tradukita en la germanan, sed ne chion kion diris la prezidento):

<https://de.rt.com/rusland/128893-putin-uber-auslandische-agenten-gesetz/>

--

2021-12-15 A. Navalnij ricevas Sahharov-premion de la Europa parlamento

Lia filino alprenis la premion kaj parolis pri ideoj de sia patro.

--

2021-12-22 MH-17 - aviadilo pafita de rusa BUK

Hodiau oni komencis la proceson kontraŭ 3 rusoj kaj 1 ukrainano. La nederlanda prokuratoro postulas viv-longan malliberejon por ili.

Char ili intence pafis al aviadilo per tiom granda armilo / obuso kiu plene detruis la civilan aviadilon en kiu mortis chiu 298 homoj.

<https://www.tagesschau.de/ausland/europa/mh17-lebenslange-haft-forderung-anklage-101.html>

= =

2021-12-11 Maria Ressa kaj Dmitrij Muratov ricevis la Nobelpremion por Paco

Maria Ressa engaghigas por la libereco de amasmedioj en Filipinoj, kaj estas akuzita pro tio.

Dmitrij Muratov estas kunfondinto de la Novaja Gazeta - eble la sola sendependa gazeto en Rusio, kiu esploras kaj raportas politike ek de 1995. Detalojn vi trovas en wikipedia.org.

--

2021-12-11 Fajfisto Assange - neglekto de Homaj Rajtoj flanke de Usono

Apelacia kortumo en Britio decidis ke Assange povas esti transdonita al la jur-sistemo de Usono, char ili garantiis jur-shtatan traktadon. Nun estas decido de la brita registaro, chu li estos transdonata al Usono.

Fajfistoj kaj ĵurnalisotoj necesas, char mensogi kaj neglekto de leghoj ankau flanke de registaroj tro ofte okazas.

Usono ne akceptis la Internacian Punan Kortumon en Den Haag, kaj nur la aktuala prezidento Biden rezignis pri sankcioj kontraŭ kunlaborantoj de IPK, char ili kondamnis usonajn shtataj krimulojn.

Aliflanke Usono chiam protestas kontraŭ neglekto de Homaj Rajtoj flanke de aliaj registaroj, sed mem ankau plurfoje kulpis pri tio - ekzemploj estas torturado, Guantanamo, kaj la mort-puno.

https://eo.wikipedia.org/wiki/Malliberejo_de_Guantanamo

= =

2021-11 Popola Respubliko Chinio - manipulas la inform-mediojn

Fashismo necesas elkludi aliajn opiniojn.

Arte sendas tiun koncizan informon (4 minutoj) en chiu 5 lingvoj de Arte (de,en,es,fr, it,pl):

<https://www.arte.tv/de/videos/089501-001-A/zensur-chinas-mediale-gegenwelt/>

Jen informo pri la chefredaktoro de Global times“: <https://www.arte.tv/de/videos/089501-002-A/hu-xijin-die-stimme-chinas/>

Kaj jen pri ĵurnalista je la limoj de sia fako: <https://www.arte.tv/de/videos/089501-006-A/cui-yongyuan-der-kritische-geist/>

2011-11 P.R.Chinio propagandas pacon, sed agas per sia militaro por etendi la landon.

en la suda parto de la t.n. Flava Maro trovigas la Spratley insuloj, kiuj parte apartenas al Filipinoj,

kaj parte PR Chinio postulas kiel sia regiono.

<https://www.deutschlandfunk.de/philippinen-werfen-china-schiffsblockade-vor-100.html>

Pri la batalo en la sud-china maro (en la angla) - videbla ghis 9a de Januaro 2022:

(necesas alighi al BBC): <https://www.bbc.co.uk/programmes/m000xxxg>

--

2008 - Olimpikaj Someraj Ludoj en Pekino - 2022 Vintraj Ludoj en P.R. Chinio

Jen filmo de tibetano kiu intervjuis homojn en Tibeto antaŭ 2004 pri iliaj opinioj rilate la Olimpikaj Ludoj. Ni vidas la tibetanojn en siaj regionoj, kaj audas kritikon - subtitolita en la anglan:

0. Por ricevi la OL 2004 la china registaro promesis respekti Homajn Rajtojn.

1. La nomadoj havas problemojn ĉar pli kaj pli estas barajhoj; la registaro ne volas nomadisman ĉar tiel malfacilas kontroli la homojn.

2. La tibeta lingvo malaperas pli kaj pli ĉar ĝi ne estas instruata, kaj ĉar pli kaj pli de la ĉefa han-etno loĝhas en Tibeto. Homoj kiuj engaghighas estas minacataj, kelkaj malliberigitaj.

3. La tibeta kulturo estas forte ligita kun la tibeta budhismo, kaj la adorado de Dalai Lama. Tiu ja akceptis la Mezan Vojon, t.s. ke Tibeto restas provinco de P.R. Chinio, sed havas plenan autonomion.

<https://www.youtube.com/watch?v=wi8U-asY1QI>

Kaj jen listo de 100 argumentoj kial ne indas fari tiajn pacemajn ludojn en P.R. Chinio:

(en la germana) <https://www.tibet-initiative.de/no-beijing-2022-100-tage-100-gruende/>

Alia asocio volas liberan Tibeton (angle): <https://freetibet.org/news>

En Vikipedio oni povas legi pri la historio de Tibeto & Chinio.

= =

2021-11-23 Putin trabatas Memorial

Memorial, fondita 1988, ankoraŭ estas neregistara organizajo: centro por objektiva prezentado de historio, defendo de homaj rajtoj kaj sociala prizorgado de viktimoj de gulagoj en (eks-)sovetiaj landoj, aparte en Rusio. Memorial kaj kunlaborantoj ricevis plurajn internaciajn premiojn; tiajn detalojn vi trovas en Vikipedio - ankau en Esperanto.

Nun la prokuratoro de Rusio postulis malfondi Memorial-on; unu el la argumentoj estas ke ili ricevas monon ankau el eksterlando, kaj tial devas ek de 2016 informi/shtampi en ĉiuj publikajhoj ke ili estas „eksterlandaj agantoj“ - ilia krimo: ili ne shtampis kelkajn el la malnovaj libroj ...

Komento AVE/mw: mutigi kritikantojn estas trajto de fashismo. Mi jhus legas la novan libron de Kalle Kniivilä, „La Malamiko de Putin“ - temas pri alia kritikanto, kiun „oni“ preskau murdis: Alexej Navalnij.

--

2021-11 Peto el Tanzanio de turisma samideano - worldremit.com, interesa ebleco transpagi

Estas multaj homoj kun korona viruso kaj mortoj en Tanzania kaj tio kaŭzis gravajn problemojn al ni, sed la registaro malrapidas pri vakcinado.

Ni, la komunumestroj, alfrontas tre gravajn problemojn rezultantajn de ĉi tiu korona pandemio.

Covid19-kazoj pliiĝas ĉiutage kun mortoj kaj ĉi tio estas maltrankvila, hospitaloj estas plenaj, sed oksigena provizo estas tre malalta.

Estas sur la ĉi-supra ke mi faras personan peton, ke vi afable venu al mi savi kun ajna helpo ebla por porti min tra ĉi tiu malfacila periodo kie eĉ akiri manĝaĵon estas granda lukto tamen multaj en mia komunumo venas al mi por helpo, kiun mi ne povas proponi ĉar mi ankaŭ luktas kun mia familio kaj la 33 studentoj, kiujn mi instruas Esperanton.

Ne venas turistoj, ni ne plu rajtas multe vojaĝi, do ni restas ene de hejmaj distriktoj.

Do la vivo estas tre malfacila por mi nun.

Se vi havas ion, kion vi povas sendi al mi bonvolu sendi ĝin tra (www.worldremit.com) kaj sendi rekte al mia konto Vodacom MPesa numero 255 747 008 067

La ĉi-supra nombro ankaŭ estas la sama kiel la telefonnumero kiam vi registras por sendi.

Davis Fabian Buliongo Bugenyi, Turisma Esperanta tradukisto, Esperanto-Instruisto, Ekskursgvidanto kaj Ŝoforo. Shukuru Nuru Tours and Safaris, Arusha, Tanzania

Davis Bugenyi <davis_bugenyi@yahoo.com>

= =

2021-11-01 Israela ministro kalumnias defendantojn de Homaj Rajtoj

Benny Gantz, ministro pri defendo en Israelo, deklaris 6 NRO-ojn (CSO-ojn) kiuj defendas la Homajn Rajtojn de Palestenanoj ke ili estas „teroristaj organizajtoj. Tiuj kunlaboras kun la oficejo de UN pri Homaj Rajtoj en Westbank kaj Gaza. La listigo de legitimaj aktivecoj kiel juristika defendo neniel rajtigas nomigi ilin teroristaj.

<https://senderfreiespalaestina.de/pdfs/israel-erklaert-palaestinensischen-menschenrechtsgruppen-den-krieg.pdf>

- -

2021-10-30 Belariusio invitas rifughintojn, kaj poste lasas ilin en danghero.

Ja estas bone, ke la prezidento Lukashenko invitas homojn el Sirio, Afghanio k.s. fughi al sia lando. Sed samtempe li sendas ilin en la limregionon de Pollando - kie ili ne estis invitataj. Kaj lau la konvencio de Dublin Pollando ne estas devigata akcepti ilin, char Belariusio estas sekura lando por ili - aliflanke ili ja ne estus fughintaj tien (au supozeble invitataj de Belariusio). Multaj homoj vegetas nun en la inter-limejo - sen suficha protekto kontrau la vetero. Lau UN (lau BBC) jam 8 homoj mortis, kaj ch. 500 atendas.

Aliflanke Pollando akceptas rifughintajn civitanojn el Belarus, kiuj vivas en danghero en sia lando.

<https://www.bbc.com/news/world-europe-59096571>

Oni povus kritiki Pollandon kaj EU ke ili ne akceptas tiujn rifughintojn, sed tio estus libervola agado.

= =

2016-10-16 Du-fojan gratulon al Rusio :)

Alexej A. Navalnji ricevis hodiau la Sahharov-Premion de la Europa Parlamento. La premio dedichas la defendon de Homaj Rajtoj, i.a. Rajto de Opinio-Libereco.

- -

Dimitri A. Muratov, chef-redaktoro de Novaja Gazeta, kaj Maria Ressa (jurnalisto de Filipinoj) ricevis la Nobel-Premion pri Paco „por la defendo de vero, kio estas kondicho de demokratio kaj daurigebla paco“. Li dedichis la premion al la murdita (pro sia jurnalisma laboro i.a. pri Chechenio) kolegino Anna Politkovskaja kaj la 5 aliaj, krome al la vivantaj kolegoj.

Detalojn vi trovos en diversaj lingvoj je: wikipedia.org

= =

2021-09-16 Rusio elektas nacian kaj kelkajn lokajn parlamentojn - fe(j)ka versio de demokratio Bedaurinde mankas internacia kontrolo de la vochdonado. OSKE (Organio por Sekureco kaj Kunlaboro en Europo) bedauris, ke ili ne povas partopreni pro troa limitado de iliaj eblecoj. Tiel ne eblas konfirmi ke la vochdonado okazis lau demokratiaj principoj.

(en la angla kaj rusa): <https://www.osce.org/odihr/elections/russia/494488>

Char la putinaj partioj ne trovas grandan simpation, oni eltrovis diversajn rimedojn:

- mankas travideblo de la vochdonado: la video-monitoringo ne estas publike videbla; ankau la diversaj partioj ne rajtas kontroli chion; ekz-e en Tomsk, videblas 4 el 96 balotejoj, lau informo de la komunista kandidato.

- enprizonigo: Alexaj Nawalny, kiu estis venenigita per Novichok en Tomsk, estis savita en Germanio, kaj pro lia flugo al eksterlando estis malliberigita. Multaj aliaj opoziciuloj estis simile akuzitaj pro io ajn afero, por ke ili ne povu igi kandidato:

https://www.deutschlandfunk.de/parlamentswahlen-in-russland-der-sieger-steht-schon-fest.724.de.html?dram:article_id=503164

- klonado: opoziciulo Boris Wishnijewski ricevis 2 konkurencajn kandidatojn kun sama nomo (kiuj antaue havis aliajn nomojn) en St. Peterburgo, ili ankau havas similajn barbojn: 3 * Boris Wishnijewski

- (en la angla): <https://www.bbc.com/news/world-europe-58504603>

- (en la franca - pluraj videoj): <https://www.arte.tv/fr/videos/RC-020662/elections-en-russie-la-chasse-a-l-opposition/>

Jen raporto el Tomsk: https://www.badische-zeitung.de/in-russland-geht-vor-der-parlamentswahl-die-angst-um?utm_source=prod-red-newsletter-daily&utm_medium=email&utm_campaign=79194&utm_content=Ausland&cn=abo-digi-x-wall-sale-

newsletter-red&utm_region=World&utm_position=9

Komento de AVE/mw: la rusa prezidento Putin ja akceptis la fejkan voĉdonadon en Belarus - ĉar hejme faras same ? Bedaurinda ludo.

--

2021-09-08 Filmo pri korupteco en Libanono - post la granda eksplodo (2020-08-04)

Oni klarigis ke unu el la problemoj estas la balancita distribuo de postenoj inter la diversaj religioj kaj etnoj en Libanono.

La eksplodo estis kaŭzita de malsekure stokita granda amaso da Amonio-nitrato, kiun oni (lau tiu informo) volis uzi por bomboj kontraŭ Hamas-batalantoj.

<https://www.arte.tv/de/videos/030273-827-A/arte-reportage/>

en tiu sama filmo estas dua parto:

--

2021-09-08 Filmo pri nostalgio en Rusio pri Stalina epoko:

USSR: NKWD / KGB - Massengräber in Karelien (Petrosawodsk, Sandarmoch) - Erinnerung*

<https://www.arte.tv/de/videos/030273-827-A/arte-reportage/>

En Odessa nuntempe je konstrulaboroj de flughaveno hazarde oni trovis tombojn por multaj murditaj laŭ ordono de Stalin (NKWD, popola komisariato pri internaj aferoj, la sekreta servo de SU) inter 1936 - 1937.

https://www.deutschlandfunk.de/odessa-massengrab-aus-stalin-aera-in-der-ukraine-entdeckt.2932.de.html?drn:news_id=1294855

https://eo.wikipedia.org/wiki/Granda_purigo

--

2021-08-17 nova islama registaro en Afganio

La 20-jara okupacio de okcidentaj landoj finis - ĉefe por konkuri la terorisman de Bin Laden (aviadila atako kontraŭ World Trade Center en Novjorko, 2001-09-11).

Usono decidis retiri la soldatojn, sekve de tio ĉiuj aliancaj ŝtatoj nepre devis fari la saman. Oni eble ne saĝe pripensis la malfortecon de la registaro de Karsai, kiu - same kiel liaj soldatoj - evidente ne volis militi kontraŭ la talibanoj sed preferis fuĝi. Sekve de tio tiuj rapide transprenis unu provincon ĉefurbon post la alia, kaj nun la registaron.

Por Germanio (mia lando) okazis hontinda afero - oni transportis la soldatojn hejmen, sed ne samtempe iliajn helpantojn kun iliaj familioj. Laŭ Jürgen Todenhöfer (CDU) kaj Cem Özdemir (Grüne/Verdulejo) kiuj bone konas la situacion, la registaro neglektis la antaŭsignojn de la rapida transpreno de povo flanke de Taliban kaj nur finfine sukcesis atingi eble 20% da ili. Kaj nun restas multaj en la lando.

Nun oni atendas ĉu la afablaj vortoj de la gvidanto de Taliban, kiu garantiis al virinoj pli da rajtoj ol ili havis dum la antaŭa taliban-regado (ghis 2001), kaj ankaŭ ke ili respektos la kunlaborantojn, instruistojn kaj aliajn oficistojn de la antaŭa registaro. Same estas demando kiom rigide ili sekvos la antikvajn Ŝario-leghojn ?

Jen diversaj videoj en la franca kaj germana: <https://www.arte.tv/fr/videos/105207-000-A/afghanistan-reactions-sur-la-scene-internationale/>

Komento de AVE/mw: Usono montris diversfoje ke ilia deziro implanti la „okcidentan“ demokration en lando kun alia kulturo, ke tio malbonighis la situacion de la simplaj homoj: Libio, Irako ... Same la morala subteno al opoziciuloj en tiaj landoj ne taugas, se oni ne povas helpi ilin atingi modernan socion, kion montris Sirio. Ekzemplo pri malfacilecoj montras la MINUSMA-trupojn de UN en Malio.

Je la 13a de Septembro mi audis de afgana virino en mia vilagho, ke ŝi audis diversajn informojn - kelkaj talibanoj kondutas brutale, sed aliaj tute saĝe subtenas la homojn - kadre de limigoj de Islama Ŝtato: knabinoj kaj knabinoj nun devas viziti diversajn lernejojn; sed en universitato tio ne eblas: tie sufichas kurteno meze tra la auditorio. Do, ankaŭ virinoj rajtas studi - simile al Irano.

--

Jen novaj inform-kanaloj en Esperanto:

globobs.com - nova tutmonda informservo en Esperanto :)

vrede.be/eo - speciale pri paco kun tradukoj en Esperanto el Belgio

eo.globalvoices.org/2021/06/11178/ - film-raportoj pri medio kaj Homaj Rajtoj en multaj linvoj

= =

2021-08-05 Putin denove kontraŭ opoziciuloj

Je la 5a de Augusto 3 diversaj NRO-oj estis devigitaj fermi siajn retejojn, ĉar alimaniere la ĵurnalistoj kiuj laboras enkadre de tiaj estus en granda danĝero. La argumento de la aŭtoritatoj estis ke tiuj projektoj estas „en kontakto kun nedezirataj organizajhoj“. Temas pri MBK Media, Open Media kaj la Projekto pri Homaj Rajtoj, kiuj estas ligitaj kun Michail Khodorkovsky.

Ekzemple Andrej Pivovarov jam estas blokita kandidati por la Duma, la parlamento de Rusio - li estas sur la listo de Jabloko; Anton Mikhajluk kaj Anastasia Shevchenko estis akutizaj ke ili organizis seminarion aŭ laboris por Open Russia.

<https://khodorkovsky.com/free-andrey-pivovarov/>

<https://khodorkovsky.com/let-pivovarov-run-for-the-duma/>

Oni povas legi pri tio ankaŭ en la rusa, sur Facebook - kie mi ne partoprenas.

= =

2021-07-22 Ekocido estas krimo

Ĉu baldaŭ eblos iri al juĝisto por la naturo? Ĉu "ekocido" (mortigo farata al ekologia sistemo) baldaŭ puneblas? (hetkanwel.nl)

Publikigita de Florine Van der Does je la 1a de julio 2021*

Longe ni kredis, ke la naturbelego ĉirkaŭ ni estas neelĉerpebla, sed ĉiam pli ofte ni spertas la limojn de ĝia elasteco. Tial nuntempe okazas forta strebo por igi ĝin, punebla la amasan difektadon kaj detruon je ekologiaj sistemoj, "eko-murdon". La eblo jure persekuti senarbarigon, malpurigadon aŭ trofiŝkaptado povus esti grava paŝo por la protektado de Tero.

Vasta kaj longdaŭra malutilo

Ekocido estas vasta aŭ longdaŭra difektado je la naturo. Tio okazis plurfoje en la pasintaj jardekoj, kio alvenigis en klimata kaj ekologia krizoj laŭ la fondaĵo Stop Ecocide.

Oceanpoluo - kiaj: troa fiŝkaptado, malpurigado per nafto kaj plasto - kaj

senarbarigo - kaŭzita de industria brutobredado, naftoborado kaj elterigo de mineraloj - same kiel la uzado de terkultivadaj venenoj, kemiaĵoj el la teksindustrio kaj eligado de gasoj el ardezaĵaj tavoloj estas ekzemploj de aferoj, kiujn la fondaĵo Stop Ecocide volas igi puneblaj krimoj.

Ili argumentas, ke la nuna malbona stato de nia naturo estas la rezulto de multaj jaroj da malutila industria agado. La fondaĵo volas punigi la kompaniojn, kiuj dum multaj jaroj intence neis aŭ kaŝis la danĝerojn de siaj agadoj al la naturo per pli ol nur monpuno.

Ecocido kiel krimo

Nun en la Statuto de Romo, la fonda traktato de la Internacia Kortumo pri Krimpunado, estas kvar krimoj: genocido, krimoj kontraŭ la humaneco, militkrimoj kaj agresa krimo. La fondaĵo Stop Ecocide volas aldoni kvinan: ekocidon. Por realigi tion dekdu famaj internaciaj advokatoj pri justico kaj ekologio el la tuta mondo interkonsiliĝis pri tiu demando. Kune ili difinis ekocidon, ili esperas povi alfronti grandajn kompaniojn, kiuj malutilas al la naturo. Pri la redaktado de la difino la prezidanto Joko Mehta diras: "Tio estas historia momento. La fakularo kunvenis por rekte agi al kreskanta politika malsato al veraj respondoj al la klimata kaj ekologia krizoj. Estas la tempo por ĝi - la mondo ekkonscias la danĝeron, kiun ni alfrontus, se ni tiel daŭrigus. La difino trovis bonan ekvilibron inter tio, kio farendas por protekti ekologiajn sistemojn, kaj tio, kio estas akceptebla por ŝtatoj (...) Registaroj konsideros la difinon serioza kaj ĝi formas funkcionta jura ilo, kiu respondas al reala kaj urĝa neceso en la mondo."

Pli ol nur monpunoj

Ke la ideo punebligi ekocidon pli kaj pli estas akceptata, pruvas la protesta manifestacio en Belgio je la pasinta dimanĉo. Kelkcentoj da homoj surstratiĝis por subteni la proponon de la fondaĵo Stop Ecocide. La manifestantoj ne estis tiel multnombraj kiel kutime. Laŭ la organizantoj la kaŭzo de tio estas, ke "ekocido" ankoraŭ ne estas kutima nocio. Ankaŭ per tiaj manifestacioj la organizantoj esperas atentigi pri la nocio ekocido. Nuntempe ne ekzistas leĝa kadro por trakti ekocidon je internacia nivelo, kaj tial ankoraŭ mankas sistemo por respondeciigi decidantojn de kompanioj kaj aŭtoritatojn pri ekologia damaĝo kaj misuzo je la natura medio. Post enigado de la nocio "ekocido" en la internacian juron, krimintoj povus esti persekutataj antaŭ la Internacia Kortego. Tiel justico kreas

pli fortan fortimigan efikon, ol ĉe civilaj juraj aferoj, ĉe kiuj la verdiktoj plej ofte temas nur pri monsumoj, kiuj poste estas klasifikotaj kiel aferkostoj. Respondeculoj pri agoj aŭ decidoj, kiuj kaŭzis gravan ekologian damaĝon, povos esti persone respondecigataj per justica persekutado.

*) Dankon por la informo kaj traduko de Leo de Cooman el: www.hetkanwel.nl/2021/07/01/ecocide/
Jen la retejoj: stopecocide.de ; endecocide.se ; ligoj al pluraj lingvoj: www.stopecocide.earth/
(iomete redaktita de AVE/mw)

= =

2021-07-21 Peticio por la Massai pashtistoj en Tanzanio ĉirkau Ngorongoro-vulkano kaj en Serengeti. La etno de Massai tradicie estas pashtistoj en la savanoj norde de la ekvatoro. Kutime ilia vivstilo estas akorde kun la naturo ĉar faris nur etan agrikulturon.

UNESKO deklaris la areon ĉirkau la Ngorongoro tutmonda heredajho. Nun la registaro de Tanzanio malpermesis al ili pashtigi tie la bovinojn. Por la Massai tio kaŭzus gravan redukon de ilia tereno kiun ili bezonas por vivteni sin. Post kritiko de UNESKO-komisiono pri la stato de ĉi-tiu heredajho, la registaro decidis novan planon por utiligo de tiu tereno sekve de tio ili forpelas la Massai. Lau ili tio ĉefe estas en intereso de turismo; kaj petas subteni ilian helpokrion al la prezidentino Samia Suluhu Hassan. Jen la retejoj en la germana kaj angla:

<https://www.regenwald.org/>

<https://www.rainforest-rescue.org/>

Komento de AVE/mw: eble sufichus postuli al la Massai teni la nombron da bovinoj en kvanto kiu lasas nutrajhon al la sovaghaj konkurencantaj bestoj tie ?

Certe Tibor Sekelij priskribis la Massai en sia libro „Ghambo rafiki“ - „Karavano de Amikeco“.

= =

2021-07-08 Protekti „fajfistojn“ kontraŭ akuzoj

Jam plurfoje okazis en EU-landoj, ke medio-protektantoj kiuj kritikis konkretajn firmaojn au organizajhojn pro medio-poluado (au korupto) estas akuzitaj - en aliaj landoj ili ofte estas mortpafitaj aparte kiam temas pri korupteco au krimaj „entreprenoj“ - en Solvacio kaj Malta (EU-membroj), en Brazilo, ktp.

Feliche akuzoj ne mortigas, sed ili povas efiki kiel ekonomia ekzekuto; unue se la jughkortumoj ne vidas la socian intereson - kaj persekutas la fajfiston; due ĉar jam la jura defendo - ofte dum kelkaj jaroj - kostas multe da mono.

Jen du aktualaj ekzemploj: la inform-kampanjo ke la poma monokulturo en Suda Tirolo uzas tro multe da pesticidoj; kaj same en suda Francio kie aktivulino informis pri pesticidoj en tiuj famaj vinoj - ŝi kaj la medio-protektita instituto (Umweltinstitut Muenchen, Germanio) devus pagi tre altan perdokomponson. Temas pri akuzoj nomumitaj SLAPP ("*strategic lawsuits against public participation*") - strategiaj akuzoj pro publika partopreno (informo).

Umweltinstitut petas subskribi leteron al la Vic-prezidantino de la EU-Komisiono Vera Jorouvá kaj la EU-Komisaron pri Justico Didier Reynders

<https://www.umweltinstitut.org/mitmach-aktionen/slapps-ein-angriff-auf-meinungsfreiheit-und-demokratie.html>

Komento AVE / mw: Certe okazas fi-informoj pri kio indas akuzi la verkistojn - kiuj kutime estas anonimaj. Sed ĉi tie temas pri publikaj informoj kiuj havas subskribon de persono au de CSO/NRO (civil-socia organizajho).

--

2021-07 P.R.Chinio kaj Tajvano -

<https://www.arte.tv/de/videos/078193-000-F/die-neue-welt-des-xi-jinping/>

<https://www.arte.tv/en/videos/078193-000-F/the-new-world-of-xi-jinping/>

<https://www.arte.tv/fr/videos/092183-000-A/taiwan-une-democratie-a-l-ombre-de-la-chine/>

<https://www.arte.tv/en/videos/092183-000-A/taiwan-a-digital-democracy-in-china-s-shadow/>

--

2021-07-06 Olimpiko en Totalisma lando ???

Tibetanoj ne volas Olimpikajn Vintro-Ludojn en P.R. Chinio dum ties registaro subpremas kelkajn etnojn (ekzemple uĝurojn, tibetanojn) kaj ĝenerale neglektas bazajn Homajn Rajtojn - ankaŭ rilate al opoziciuloj el la han-ĉinoj.

La geamikoj de tibetanoj petas subteni peticion al la germana asekura-konzerno Allianz, kiu pretas subteni chi-tiun eventon, kiu estas planita por Februaro 2022 (ankau ?) en Orienta Turkestano, t.n. autonoma provinco de la uĝuroj.

Pliaj detaloj: <https://www.tibet-initiative.de/> ; <https://nobeijing2022.org/> ; tibet.net (ekzil-tibetanoj) (retejo pri tiu peticio ankaŭ en la germana):

<https://www.change.org/p/allianz-group-allianz-cancel-sponsorship-of-bloody-winter-olympic-games-in-china-2022-immediately>

Komento de AVE/mw: pro la gigantaj investoj, grandskalaj konstrulaboroj ankaŭ en protektitaj regionoj indas pripensi ĉu tiaj tutmondaj sportaj okazajhoj povas esti shanghataj al pli daŭripova maniero. Niaj geamikoj en Francio antaŭ nelonge diskutis (dank' al Beno Shar - speciale rilate Olimpikon 2024 en Parizo) pri la efiko sur la urba medio. Ĉu eblos akordi sportan entuziasmon kun zorga atento al la medio ? Ĉu komercaj interesoj koruptas sporton ?

= =

2021-09-22 Memore al komenco de la agreso de nazia Germanio kontraŭ Sovetunio

La frakcio de Verduloj en la germana parlamento okazigis historian rondon por informi kaj diskuti omaghe al ĉiuj viktimoj de la nazi-germana milito kaj rasismaj genocidoj (ĉefe kontraŭ judoj kaj romaoj). Partoprenis ĵurnalistoj kaj historiistoj el Germanio, Rusio, Belarus kaj Ukrainio; inter ili D-rino Irina Shcherbakova, kunfondintino de Memorial en Rusio.

Je la 22a de Junio 1941 je la 4a matene la nazia Germanio atakis SU-on en Brest, L'vov, k.t.p. laŭ tiu linio kiun difinis tiu pakto.

Indus mencii, ke Pollando antaŭ la partigo flanke de Prusio, Austrio kaj Rusio kovris multe pli grandan terenon ol nun, inter Gdansk - Poznan - Katowice (en la okcidento), al granda parto de nuna Ukrainio (ghis antaŭ Kievo), de Belorusio (ghis Witebsk), Litovion kaj parton de Latvio (ghis antaŭ Riga). Orienta Prusio (nuna Kaliningrada regiono) apartenis al Germanio. Post la Unua Mondmilito je la Paco de Riga (1921-03-18) Pollando denove etendighis ghis la Duna-rivero nordoriente ghis proksime de Minsk, krome al la distriktoj de Wilno, Polesio, Luck, Tarnopol kaj Iwano-Frankivsk.

Pro la sekreta interkonsento je la 24a de Augusto 1939 inter Hitler kaj Stalin (respektive la ministroj Ribbentrop kaj Molotow) al Sovet-Unio eblis okupi - post la komenco de la Dua Mondmilito 1939-09-01 - la 3 baltajn landojn je Junio 1940 (Litovion kaj Orientan Prusion pli poste) kaj ankaŭ la orientan parton de Pollando kaj la nunan Moldavion. La sovetia teroro tuj komencis en tiuj orientaj regionoj. Neimageble terure agis la germanoj post tiu 22a de Junio 1941 en la okupataj regionoj. Estas longa listo de militaj krimoj, krome milionoblaj krimoj kontraŭ la civila populacio. Por ne forgesi tian hontigan kriman militon oni rememoras tiajn tagojn en Germanio por ne plu okazu simila flanke de Germanio. La germana prezidento Steinmeier metis funebran florkronon je la sovetia honor-memorloko en Berlin-Pankow.

Por ekscii pli pri la detaloj vizitu: [wikipedia.org](https://www.wikipedia.org) - Dua Mondmilito.

Jen la memor-okazajho de la Verduloj:

<https://www.gruene-bundestag.de/termine/gedenken-und-verantwortung>

--

2021-06-22 Kanado devus shanghi la batalon kontraŭ drogo-misuzo

La Verduloj en Kanado postulas liberigon de opioidaj drogoj, kun paralela evoluo de kuracista helpo al homoj kiuj bezonas helpon. Drogo-misuzo estas manio, kaj malsano - krimigo malhelpas al tiuj kiuj falis en tian manion. Mi lasas la detalan tekston en la angla por niaj kanadaj geamikoj.

The federal government still insists on treating drug use and addiction as a criminal matter. The reality: addiction is a health issue and criminalization is a key contributor to opioid-related deaths. Opioid-related deaths are at record highs, with 18 people dying each day in Canada. People need care, not punishment or incarceration.

[This is why the Green Party has called for the government to decriminalize the possession of illicit drugs, and to create a national safe supply program.](#)

Guided by the consensus among leading public health officials, Greens have called for possession of illicit drugs to be decriminalized no later than this upcoming Canada Day, July 1.

The avoidable loss of life has been made worse by the pandemic. The current approach of criminalizing drug use creates stigma and this must end if we want to end the opioid epidemic.

Annamie Paul, estraranino de la Verda Partio en Kanado petas (siajn samlandanojn) sendi leteron al la registaro: <https://www.greenparty.ca/en/content/decriminalization-now>

= =

2021-06-21 Torturoj kaj marchandoj en Rusio kaj la Doneck-regiono

Memorial deklaris Aleksander Marchenko-n politika malliberulo.

Estis longa rakonto - legebla en la Badische Zeitung au che memoHRC.org. Chiukaze estas kruela okazajho esti senkulpa (rilate la akuzo de spionado) viktimo de avido kaj kruelecemo de rusiaj kaj pro-rusiaj oficialaj organoj.

(en la germana) <https://www.badische-zeitung.de/ausland-1/wie-der-krieg-in-der-ukraine-menschenleben-zerstoert?>

(en la rusa) <https://memohrc.org/ru/defendants/marchenko-aleksandr-vladimirovich>

<https://memohrc.org/ru/monitorings/lamborghini-diablo-poputal-kak-avtolyubitel-stal-shpionom>

--

2021-06-20 Irano - nova prezidento je plej malalta subteno de civitanoj.

la eklezie-ekonomia reghimo en Irano malpermesis opoziciajn kandidatojn, restis malmultaj reghimo-afabluloj kiel tiu kiu nun ricevis la vochojn. Lau informoj 1988 li chefe respondecis la ekzekutojn de 5000 politikaj malliberuloj, kaj kiel Ministro pri Justico okazis mortpafado de 1000 manifestaciantoj. 7000 estis malliberigitaj. Li grandskale malrespektis Homajn Rajtojn.

<https://www.dw.com/de/wer-ist-irans-designierter-pr%C3%A4sident-ebrahim-raeissi/a-57965824>

<https://www.dw.com/de/meinung-die-islamische-republik-iran-wahrt-nicht-einmal-mehr-die-fassade/a-57985163>

Komento AVE/mw: Mi ne scias chu la nova prezidento de Irano povas fieri ke li estis elektita je la plej malforta partopreno de elektantoj (nur ch. 50% partoprenis), de ili li ricevis 62%; sed la sekvan rangon kun 3,7 milionoj da vochoj okupis la Nenio - homoj kiuj estis devigitaj elekti, sed donis senvaloran balotilon.

Tia prezidento jam de komenco damaghas al „sia“ popolo, char li ne sukcesos mildigi la internaciajn sankciojn kontrau Irano.

Se iu volas defendi lin per bonaj argumentoj - mi volonte dissendos.

--

2021-04-25 P.R.Chinio detruas koralajn rifojn - por etendi sian teritorion

Tiu lando troe investas en sian militaran evoluon, kompare kun la kresko de sia ekonomio.

Prezidento Xi celas superi Usonon. Krome agas kontrau internaciaj leghoj, char la kreado de insuloj estas malpermesata. Ne nur pro la ekologiaj detruoj - de koralaj rifoj; sed pro la etendo de la propra teritorio. La sudorientaj najbaroj de P.R. Chinio delonge plendas, char ghis nun tiu parto de la maro estas libera. Tajvano ofte estas ghenata de chinaj milit-aviadiloj. Bedaurinde UN ne plu akceptas Tajvanon kiel shtato. Feliche Tajvano evoluis al bona demokratio, kompare kun la tiel nomata Popola Respubliko - kie sole ekzistas kaj regas la komunisma partio.

= =

2021-06-17 Militara fino de popola ribelo en GDR

Hodiau estas la memortago de ribelo de laboristoj en GDR (1953) char tie la registaro trudis pli kaj pli altajn laborkvantojn. Je tiu tago sovetiaj tankoj subtenis la reghimon kaj perforte finis la manifestaciojn. Chirkau 34 homoj estis mortigitaj kaj multaj vunditaj dum la okazajho, 7 mort-punitaj kaj malliberigitaj (pro tio mortis pliaj 8 homoj). Krome la tuja sovetia jughkortumo mortigis plurajn, inter ili membruj de la Rugha Armeo kiuj rifuzis pafi en la homamason. Similaj manifestacioj au klopodoj mildigi la politikan sistemon okazis en Hungario (1956), Chehoslovakio (1968), kaj finfine ankau en Pollando (pluraj datoj, kaj finfine 1989 sukceso).

Komento AVE/mw: Al mia raporto pri la nova historio de baltaj landoj venis pluraj reagoj. Pro tio mi publikigas la detalan respondon de Valentin Seguru el Rusio, char certe eblas komenti la okazajhojn el diversaj vidpunktoj:

Tamen, se konsideri, ke ĉio dirita de vi kaj bazita sur nuntempaj baltiaj fontoj -

estas vero, ĝi estas tute ne plena vero ! Kaj la neplena vero ofte ŝajnigas esti malvero ;

De nia vidpunkto la afero aspektas iom aliel. Multaj baltianoj batalis POR la Granda Oktobra

revolucio !!! Plej elokventa ekzemplo: la divizio de "Latvaj pafistoj" organizita dum la Unua mondmilito, kiu plejparte transiris al la flanko de bolŝevistoj post la Oktobra revolucio, estante unu el la unuaj ruĝarmeaj divizioj.

Estas same vaste konata, ke "Ruĝaj latvaj pafistoj" gardis la unuan Sovetian registaron, gvidata de V.I.LENIN. Plue. Multaj baltianoj, servis en NKVD kaj poste partoprenis reprezaliitojn a'u estis mem reprezaliitaj dum I.V.STALIN-gvidado.

Nun pri Dua Mondmilito. Miloj da baltianoj honeste servis en Ruĝa Armeo, defendante komunajn sovetian patrujojn. Ve, ankaŭ multaj servis en armeaj trupoj sur la flanko de A.HITLER.

Enkluzive en SS ĵĵ Okaze de kio ili mortigis milojn de samlandanojn, enkluzive hebreaĵojn, estante ofte pli kruelaj ol germanoj mem ĵĵ

Kaj nun tiuj baltianoj, kiuj postvivis militon kaj iliaj (ideaĵ) nepoj partoprenas marŝojn de SS-veteranoj. Precipe per tio elstaras RIGA ĵĵ

La civila milito en Baltio ne finiĝis: nun gajnis la "blankuloj", kiuj konstruis naciismajn ŝtatojn, kie rusoj, kiuj konstruis baltia industrio ofte ne samrajtas eĉ jure ĵ Kaj ni nemandu baltianojn:

ĉu ĉi kontraŭkomunista revolucio gvidis ilin al prospero ?

Vidu statistikon:

kiom da baltianoj forlasis siajn landojn por labori en okcident-landoj ?

Tre dubinda "sukceso" de postsovetiaj registaroj ĵ

Ĉu forlasi sian landon pro manko de laboro a'u pro malalta salajro signifas feliĉon ?

Amike, Valentin SEGURU

--

Komento de AVE/mw:

Mi ĉerpis la informojn pri la Stalina Teroro en Baltio ĉefe el wikipedia.org - en la germana - kutime tiuj artikoloj estas kontribuoj de multaj personoj, mi ne kontrolis kiu verkis kion.

SU post la deportado setligis rusojn en la baltajn landojn. Multaj el tiuj ghis nun ne lernis la naciajn lingvojn. Laŭ reguloj de EU la rusa lingvo devus havi minoritatajn rajtojn. Sed por igi ekzemple civitano de Estonio oni devus scii la estonan.

2019 survoje al la UK en Lahti mi loĝhis dum 3 tagoj en Tallinn-a hotelo "von Stackelberg" (en ilia malalte kosta parto); pli poste mi vidis en mia biblioteko libron "Geliebtes Sibirien" (amata siberio) de kuracisto Traugott von Stackelberg, kies familio vivis en Estonio. Li priskribas la eventojn post la komenco de la Unua Mondmilito.

En la EU-parlamento sidas delonge Tatjana Zhdanoka el Latvio, kiu defendas la rajtojn de ruslingvanoj en Baltio. Ŝi apartenas al nia Frakcio de Verduloj kaj Regionalistoj:

Jen la retejo: <https://www.greens-efa.eu/de/who-we-are/our-meps>

kaj en la rusa: <https://tatjana-zdanoka.livejournal.com/>

= =

2021-06-14 antaŭ 80 jaroj komencighis Stalina teroro kontraŭ la baltoj

Pro la sekreta interkonsento je la 24a de Augusto 1939 inter Hitler kaj Stalin (Ribbentrop kaj Molotow) al Sovet-Unio eblis okupi la 3 baltajn landojn je la Junio de 1940 (Litovion kaj Orientan Prusion pli poste). La sovetia teroro signifis por pli ol 50.000 homoj la deportacion al Siberio, kie ili devis resti ghis la morto de Stalin, se ili ne restis tie por eterne, ĉar mortis pro la tre malbonaj cirkonstancoj. Kaj centoj estis mortpafitaj pro politikaj kauzoj.

Je la 22a de Junio 1941 la nazia Germanio atakis SU-on en Brest. Kaj baldau poste forpelis SU-on el la baltaj ŝtatoj; tio estas la komenco de murdado de pli ol 200.000 judoj en tiu regiono. Post la re-okupado de Baltio flanke de la Ruĝa Armeo la deportacioj al Siberio estas daurigataj ghis 1949. Pro tio ne mirindas, ke en la okupaciaj muzeoj en Riga kaj Tallinn la rusa okupacio estas la ĉefa temo. Kaj ke la baltaj landoj tre bezonas la protekton flanke de NATO - kion ili deklaris hodiaŭ. Bedaurinde tro ofte ankau Rusio ghenas/minacas la baltajn landojn per militaraj aviadiloj, au atakas la elektronikajn sistemojn per „cibermilito“. Malfacila najbareco*

Krome: en Riga estas tre bona muzea aranĝo (parte sub-ĉiela) pri la vivo kaj Holokaŭsto de la judoj en Latvio - en la „rusa“ urboparto proksime de Daugava. Fakte tiuj judoj kiuj estis deportitaj de Stalin havis pli bonan ŝancon postvivi, similie kiel en Ukrainio (ekz-e de L'viv).

*) Komento AVE/mw: mi ne tre emas militarajn rimedojn, tamen vidas ke estas bone ke oni

kontrolas la proprajn limojn, instalas defendajn rakedojn kaj tankojn. Ni (EU) ne volas militon kontraŭ Rusio, sed pacajn najbarajn rilatojn kun Rusio. Kaj ni akceptas ankau la deziron de Ukrainio resti sendependa de Rusio, malgrau la longa komuna historio.

= =

2021-06-10 Nawalny = ekstremisto ? Rusio = pli kaj pli totalisma sistemo !

La urba jughkortumo de Moskvo malpermesis la fonduson kontraŭ korupcio (FBK) kaj la regionajn oficejojn de Nawalny ĉar tiuj estus ekstremismaj. Jam antaŭe, je la 4a de Junio prezidento Putin subskribis leĝon ke homoj ne rajtas kandidatighi je elektoj (de la ŝtata parlamento Duma ĝhis al urbaj konsilio) kiuj gvidis ekstremisman organizon ene de la lastaj 5 jaroj au subtenis tiajn ene de la lastaj 3 jaroj.

Pere de tiuj du leĝoj Putin baras la eblecon kandidatighi al pluraj mil subtenantoj de Nawalny.

Amnestio Internacia kritikis ambau leĝojn kiel „agreso kontraŭ civil-sociaj aktivecoj“ kaj ke libera prezento de opinio kaj asociiĝo estas subpremitaj.

Lau la analiza libro de Zhelju Zhelev „Fashismo“ en Rusio sub Putin pli kaj pli evoluighas totalisma ŝtato, ĉar evidente ankau la jughkortumo sekvas la volon de la prezidento. Nek Nawalny, nek liaj subtenantoj faris eksplodojn au similajn krimajn agojn.

Se kritiko je la registaro ne plu eblas, se demandantaj asocioj estas malpermesataj, se parlamento akceptas tiajn troigantajn leĝojn, se jughistoj akceptas tiajn, tiam temas pri totalismo.

(Lau informoj de G. Dornblüth, <https://www.tagesschau.de/ausland/europa/nawalny-extremismus-101.html>)

Komento de AVE/mw: La informoj kaj pridemandado pri la riĉeco de Putin estus tute normala afero en demokratia lando.

= =

2021-06-02 Putin lernis de Hitler

Ankorau oni miras kial Hitler tiom rapide sukcesis igi „gvidanto“ de la totalisma fashisma Nazi-ŝtato en Germanio. Tio estis totala akcidento de la tiama demokratio.

Li unue malpermesis la komunistan partion, kaj la aliaj partioj estis indiferentaj (au ĝhojis pri tio). Je la sekvaj elektoj, kiujn li tuj ordonis, lia NSDAP ancorau ne gajnis la majoritaton. Li prezentis leĝon pri plena rajtigo de li, kiu bezonis 75% - kaj tion rifuzis nur la Soci-demokratoj. Poste ... (necesus verki detalan artikolon pri tiu akcidento)

La rusa prezidento nuntempe (kaj denove) malliberigas fortajn opoziciulojn, ke tiuj ne povas kandidatighi en Septembro por la denove elektota parlamento:

Temas i.a. pri Alexej Nawalny, Andrey Pivovarov, Dmitri Gudkov, Yulia Galiamina.

Li malpermesis la Civil-socian Organizaĵon „Open Russia“ (Otkrytka / Malferma Rusio).

Simile: 2021-05-19 studentaj ĵurnalistoj de DOXA estis malliberigitaj, ĉar ili kritikis la registaron.

Informo pri Rusio: Khodorkovsky.com

Memorial pri Homaj Rajtoj: memo.ru kaj memohrc.org/en

- - -

2021-05-35 rememoras politika masakro sur Placo de la Chiela Paco

La registaro de P.R.Chinio ne permesas rememori al tiu ŝtata masakro kontraŭ pace manifestaciantaj kaj okupaciantaj studentoj sur tiu granda placo (kaj ĉirkaŭe); tiam estis mortpafitaj pli ol mil homoj; multfoje pli estis vunditaj. Ancorau nun la registaro ne permesas rememori tiun okazajhon, kion petas la asocio de Patrinoj de Tian-an-men.

Tre konciza artikolo en Esperanto sur eo.wikipedia.org

= =

2021-05-23 Belarus akaparadas civilan aviadilon

evidente ordonita de la belarusa diktatoro Lukashenko militaviadilo devigis civilan aviadilon surterenighi en Minsk. Oni asertis ke bombo estus en la aviadilo; ech se tiu estintus prave, la alcelita flughaveno de Vilnius estis pli proksime! Intertempe la aviadilo rajtis daurigi sian flugon, kaj mankis 5 personoj (Protasevich, lia amikino kaj 3 nekonataj personoj kun rusaj pasportoj, unu el tiuj alparolis lin, evidente por kontroli ĉu li estas Protasevich). Bombo ne estis trovita; sed unu homo kiu estas danghera por Lukashenko. Lau informoj el Litovio restis en Minsk ankau kelkaj personoj - supozeble de la sekreta servo de Belarus. Evidente la sola celo estis eltiri ĉi-tiun

personon el la aviadilo - Roman Protasevich, estro de la informa platformo Nexta. Nexta organizis la civitanajn manifestaciojn kontraŭ la fraudita baloto (Aŭgusto 2020). Tia agado estas kontraŭ chiuj internaciaj reguloj kaj leghoj; krome oni endanherigis la civilan aviadilon deviiginte għin. EU kaj NATO protestis; same Amnestio Internacia, kaj Raportistoj senlimaj.

Viola von Cramon* (Verduloj/Libera Alianco, MEP en la eksterlanda komisiono de EP) diris ke EU devas pli forte reagi ol għis nun. Ĉar la reghimo en Belarus malliberigis multajn civitanojn kiuj manifestaciis, kaj kelkaj mortis en la malliberejo. Necesus ekonomia respondo, ĉar eksporto finansas la reghimon.

Kaj je la sekva tago (24a de Majo) Belarus prokrastis ekflugon de germana aviadilo, kiu estis komplete traserchita. https://www.deutschlandfunk.de/belarus-kapert-passagierflugzeug-wir-haben-es-mit-einem-akt.694.de.html?dram:article_id=497735

Komento MW:

mi mem dufoje spertis tre malagrablajn situaciojn traveturinte per trajno Belarusion. Pro tio mi evitas tushi tiun landon dum estas tia reghimo. Estus interese scii kiel reagis la rusa prezidento.

*) Viola von Cramon iam vizitis la Esperanto-Centron en Herzberg.

= =

2021-05-15 Israelo & Palesteno - necesus kompreni ambau flankojn:

adicie al AVENO de antaŭaj tagoj indas noti aliajn faktojn kaj opiniojn.- Ĉar Germanio iom intensigis la elmigradon al Palesteno mi interesighas pri tiuj sekvoj; nia L.L. Zamenhof kiel studento partoprenis en cionisma organizo, sed poste forlasis tiun movadon, ekzemple ĉar Palesteno estus tro malgranda. Li ighis internaciisto.

La cionisma ideo reveni al la t.n. "laudita lando" jam komencighis en la 19a jarcento. Dank' al la Balfour-Deklaracio oni ebligis la organizitan enmigradon post la venko kontraŭ la Osmana Imperio. La „Unuigo de Popoloj“ transdonis la mandaton por Palesteno al Granda Britio, sub la jenaj limigoj (koncize): „għi uzu ĉefe la terenon de la iama osmana shtato kie la judoj loghu komune; la civitanaj kaj religiaj rajtoj de ne-judaj loghantaro ne estu ghenitaj; ktp.“

1933 ebligis la t.n. Ha'avara-interkonsento inter la nazia Germanio kaj iu juda asocio la elmigradon de 50.000 germanaj judoj al Palesteno (għis 1941); ili rajtis transpagi 75% de ilia kapitalo al Palesteno. La nazia Germanio jam 1933 malpermesis kelkajn profesiojn (ekz-e jurista) por judoj. Aparte post la kontraŭ-judaj leghoj 1935 en Germanio intensighis tiu elmigrado. Britio limigis la enmigradon (supozeble pro la limigoj de la Balfour-deklaracio ?). David Ben-Gurion 1942 petis la britan registaron malfermi la pordojn de Palesteno por enmigrontoj, sed tion ne atingis. ...

1947 akceptis la UN la fondon de israela kaj araba shtatoj kaj dividis la terenon inter Jordan-rivero kaj la maro; kun Jerusalemo sub internacia kontrolo. Tuj poste komencis la fugho au forpelo de la araboj el la israela tereno. (mi ne komprenas kial pri tio ne estis iu interkonsento)

1948-05-14 Ben-Gurion deklaris la fondon de la Israela Shtato.

... nun ni estas en la jaro 2021 ...

Post auskultado de diversaj TV-informoj (arte.tv), legado de libro de Felicia Langer (juda advokato por palestenaĵ viktimoj de israela reago - inkluzive de torturado) „An age of stone - La tempo de la shtonoj“ (verkita 1989). 1999 la uzado de torturo estis nur limigita, sed ne tute malpermesata !. Pri sekvoj de torturo mi multon legis en la libro de Felicia Langer.

Lau Bettina Marx, oficejo de „Heinrich Boell Fonduso“, la fonduso de la germana Verda Partio, la denova prokrasto de parlamenta baloto en la Okcidenta Bordo (West Bank), tereno regata de Fatah, kauzis dubojn ĉe la civitanoj, aparte junuloj; krome la okupacio pasho-post-pasho de tuta Jerusalemo - inkluzive t.n. Sanktaj Lokoj por islamanoj - flanke de Israelo subtenata de Usono, kauzis malesperon. Pro tio komencighis manifestacioj.

Kiam tiuj akriĝis - ili laudis la rakedo-atakojn de Hamas el Gaza; bedaŭrinde mankis alia internacia subteno (defendi la ekzistarojn de palestenoj kie ili vivas) pro tio la „salutoj de Hamas“ estis bonvenigitaj, kaj la manifestacioj perdis la paceman trajton. (*1)

La estro de UNRWA por subteni palestenojn, skribis ke la invado en la Al Aqsa moskeon flanke de israela polico (au simila milico) estis la komenco de la aktuala radikaligo de arabaj homoj. Li opinias ke per la bombado de Gaza - kiel reago al la Hamas-rakedoj, kiujn li kompreneble kritikis - okazos plia radikaligo. Intertempe mortis ĉ. 130 araboj kaj 8 judoj; krome pli ol 10.000 ighis senhejma - ili loghas provizore en lernejoj de UNRWA.; la detruado de loghdomoj li taksis troiga reago de Israelo. (*2)

Kaj indas mencii, ĉar mi jam kritikis la konstitucion de Hamas, ke Israelo ekde 2018 decidis plian bazan leghon (laŭ vortoj: Baza Legho - La Nacia Shtato de la Juda Popolo) - la voĉdono (62 : 55). Tiu legho difinas la unuigitan Jerusalemon ĉefurbon. La hebrea lingvo estas la sola oficiala lingvo, la araba ricevis nur apartan statuson.

Jam 1980 Knesset, la israela parlamento, decidis Jerusalemon-leghon, kiu deklaris la tutan urbon ĉefurbo de Israelo. Sed per Rezolucio 478 la UN Sekurecokonsilio malakceptis ĉi-tiun leghon, ĉar temas pri anekso de teritorio kiu ne apartenas al Israelo. Mi ne vidis kiamaniere tiu afero shanghighis. Shanghighis nur la sinteno de la usona registaro de la prezidento Trump, ne tre sincera homo.

(adiciaj fontoj: (*1) Deutschlandfunk.de, (*2) taz.de, wikipedia.org)

Komento de AVE/mw:

Mi kritikis Hamas, ĉar ili ne respektas la ekzistrajton de Israela shtato, kaj la milojn da rakedoj kiujn ili pafas al israelaj urboj; ili detruas la propran estontecon.

Mi ankaŭ kritikis la israelan registaron, ĉar ili tranchadas diversmaniere (laŭ Salami-taktiko) aneksante la terenojn de la palestenanoj.

Netanjahu supozeble profitas de tiu perforta reago kaj fendado de palestenanoj okaze de la sekvaj balotoj ? Ni vidos ĉu el tio sekvos longdaŭra paco ?

Mi iam parolis kun oficisto de Keren Kayemet Le Israel (israela fonduso - ĉikaze por la rearbarigo de Negev, kion mi subtenis). Li klarigis ke judoj ne plu (post la romiaj tempoj) havas teritorion kie ili povas vivi en sekureco, ĉar dum la tuta pasinteco okazadis pogromoj kontraŭ ili. Li diris/opiniis ke la arabaj palestenanoj pli facile povus translokighi al aliaj arabaj landoj por trovi novan hejmon.

Eble Israelo devus subteni tion per aparte granda fonduso - subteni libervolan translokighon ?

= =

2021-05-13 Komentoj pri la milito inter Hamas kaj Israelo

Post la informo hodiaŭ matene atingis min komentoj de israelaj geamikoj. Mi klopodas resumi koncize:

1a. En la preamblo de konstitucio de HAMAS ankoraŭ trovighas la celo al plena neniigo de la israela shtato, ktp. !

1b. La malpli agresema partio de palestenanoj, Fatah, sub J. Arafat, 1993 shanghis sian konstitucion kaj akceptis la ekzistrajton de Israelo.

2. Unue okazis agreso per shtonoj kaj boteloj kontraŭ la polica garnizono je la Al Aqsa moskeo.

La israela polico komencis per akvo-jhetiloj kiam la junuloj atakis ilin kaj ankaŭ preĝantajn judojn je la Lamenta Muro per shtonjhetado; do, la t.n. pacema manifestacio ne estis (tute) pacema. Temis pri 4 domoj/dometoj kiun la homoj devas forlasi.

3. Semajnoj antaŭ la nunaj eventoj Hamas sendis bruligajhojn pere de balonoj por ekflamigi kampojn.

4. Se Hamas uzus la monon - kion ili investis en miloj da rakedoj - por subteni la homojn en Gaza, estus pli bone. Parto de tiuj rakedoj falis en la propran terenon de Gaza.

5. En pluraj urboj de Israelo judoj vivas pace kun arabaj najbaroj (ĉ. 20% de la populacio).

6. Eble estus pli saghe ke Israelo ne uzus sian plenan forton respondante la Hamas-rakedojn, ĉar la kvanto da mortintoj sur ambau flankoj estas (7 : 83 - laŭ hodiaŭa informo), krome multaj vunditoj kaj grandaj damaghoj je konstruajhoj.

Komento AVE/mw: Por ni restas preghi al fortaj kaj saghaj konsilantoj je ambau flankoj.

= =

2021-05-09 Komenco de nova milito inter judoj kaj araboj en Israelo & Palesteno

mi resumas (tre/tro koncize) aktualan informon de „forum ZFD“ (forumo de civilaj paco-servoj): komencis pro deviga forpelo de palestenaj loĝantoj en la urbo-parto de Jerusalemo, Sheikh Jarrah. tien ili fuĝis post la milito 1949 ĉar ili perdis siajn terenojn en la nun israelaj teritorioj.

Tiam la jordanaj instancoj donis la terenon al la fuĝintoj. Ili luprenis loĝejojn de israelaj posedantoj (kiamaniere tiuj ighis posedantoj ne estas skribite) kaj israela legho permesis al tiuj familioj resti tie dum 2 generacioj. Nuntempe la posedantoj rajtas forpeli la palestenajn (arabajn) loĝantojn. Pro tio homoj de kristana, juda kaj islama religio protestadas komune kaj pace ek de 10 jaroj kontraŭ tia forpelado. la „guto kiu troplenigis la barelon“ estis la rememor-festo de ortodoksaj judoj de la fino de la „6-taga milito“ (1967), kiam Israelo konkeris la malnovan unrboparton de

Jerusalemo. Por protekti la feston kontraŭ pacemaj manifestaciantoj la israelaj milicoj perforte, uzante akvo-kanonojn kaj larmigan gason, ankaŭ antaŭ la Al-Aqsa moskeo (kaj meze en Ramadano). La palestena Hamas postulis distanci milicojn de la moskeo. Ankaŭ menciindas ke la 15a de Majo estas la „Naqba-Tago“ - protesto kontraŭ la forpelado de 700.000 palestenanoj el la hodiaŭa tereno de Israelo.

Pro tio la nuna milito ekflamis. Hamas jhetas el Gaza multajn rakedojn al israelaj urboj, kiel Tel Avivo - ghemela urbo kun Freiburg (Germanio). Mortis kelkaj judoj; sed ĝenerale la defendokvalito en Israelo estas tre bona. La israela armeo respondas per rakedoj al Gaza kaj klopodas detrui la domojn de kie venis la unuopaj rakedoj, malgraŭ tio ke Israelo kutime anoncas la rakedojn, jam mortis pli ol 40 homoj en Gaza, inter ili ankaŭ infanoj. Necesas aldoni ke Hamas ofte jhetas la rakedojn el altaj loĝdomoj.

(lau: <https://www.forumzfd.de/de/jerusalem-mittelpunkt-der-gewaltspirale>)

Komento AVE/mw: Bedaurinde en Palesteno delonge mankas parlamentaj balotoj, ĉar oni prokrastas ilin daŭre; kaj Hamas kaj Fatah ne sukcesas interkompreniĝi.

Ambaŭ religioj ankoraŭ arkaikaj pensas pri „okulo kontraŭ okulo, dento kontraŭ dento“ ili devus rememori al tiu aramea (au juda ?) Jesuo kiu aboliciis tian manieron intertrakti problemojn. Sed ankaŭ siaj posteuloj ofte forgesas tiun ordonon.

Pro la deklamo de la antaŭa usona prezidento Trump la situacio akriĝis, kiam tiu akceptis ke tuta Jerusalemo iĝu juda teritorio, kaj tien translokiĝis sia ambasadejo.

Ni esperas ke la politikaj „onklaj shtatoj“ Irano kaj Usono denove interparolos por trovi armisticon kaj solvon. UN ja ne havas povon diri „haltu !“.

= =

2021-05-08 Historiaj tagoj - koncizaj rememoroj kaj ligoj al nuntempo

- Napoleon mortis antaŭ 200 jaroj - li komencis reorganizi Europon, sed poste perdis la saghecon ...

1945-05-08 finfine la fino de la Dua Mondmilito: Hitler mortigis sin, kiam la Rugha Armeo atingis la Reichstag en Berlino kaj tie metis la sovetian flagon. Dank' al la kunlaboro de Usono. Kaj dank' al la pakto inter Hitler kaj Stalin Sovetunio opiniis ke ili rajtas okupi la baltiajn shtatojn; prenis parton de la teritorio de Pollando.

- Andrej Sacharov naskiĝis antaŭ 100 jaroj - li estas la „patro de la rusa H-bombo“ sed kiam li postulis la enkondukon de demokratia sistemo, li ne rajtis publikigi kritikon, ne rajtis forlasi la urbon; kunfondinto de „Memorial“ kiu defendas la Homajn Rajtojn en Sovetunio kaj nun en Rusio. Detala dedicho kaj pri liaj atingoj en fiziko kaj pri lia engagiĝo en la germana „Physik Journal“ de Majo 2021.

- Sophie Scholl naskiĝis antaŭ 100 jaroj - ŝi estis mortigita la 22an de Februaro 1943 nur 4 tagoj post la disdivido de flugfolioj de la disidenta grupo de studentoj „Weisse Rose“. Ŝi jhetis amason da flugfolioj (alvoko fini la mondmiliton) en la enir-salono de la universitato LMU de Munkeno, kaj jam 4 tagojn poste ŝi, ŝia frato Hans k.a. estis mortigitaj post „Popola Tribunalo“ de R. Freisler. Ili protestis ek de 1942 kontraŭ la krimeca milito de la nazia reĝimo.

- hierau Taliban diras ke IS (islama shtato) eksplodigis lernantinojn apud lernejo en Kabul, mortis 50 lernantinoj. Ĉar Usono kaj aliancoj nun forlasis Afĝanion, necesus sendi internaciajn UN-soldatojn por protekti la virinojn, kaj la socion ĝenerale por subteni evoluon al stabila shtato.

- Ne okazos baloto en Palesteno - post 15 jaroj - denove prokrastita ... (demokratia aspektas alimaniere), (informo de Deutschlandfunk.de, wikipedia.org, ...)

= =

2021-05-05 G7-ministroj de ekstera politiko kritikis la registarojn de PR Ĉinio kaj Rusio

Illi kritikis Rusion pro la malrespekto de la Bazaj Homaj Rajtoj (aktuala ekzempl A. Nawalny) kaj la malstabiligaj agadoj (per amasaj militaro je la limo al Ukrainio kaj disinformado).

Ili kritikis PR Ĉinion pro la subpremo de uĝuroj, kaj postulis liberan aliron de UN-monitorantoj.

(lau www.tagesschau.de/ausland/g7-russland-china-101.html)

- -

2021 -05 PR Ĉinio survoje al totalismo - manifestacii malpermesita

Joshua Wang estis kondamnita al pliaj 10 monatoj de mallibero, kaj kun li aliaj disidentoj en Hongkongo, ĉar ili partoprenis manifestacion omaghe al la amasa mortpafado de la Rugha Armeo

(pli ol 2000 mortis, 7000 vundigitaj) sur la Placo Tian an Men en Pekino je la 3a/4a de Junio 1989.
(www.tagesschau.de/ausland/asien/wong-haftstrafe-hongkong-101.html)

--

2021-04-30 PV el XinJiang (Ujgurio) - gulaga laboro

La brita gazeto Guardian publikigis informon ke en la gulagoj de XinJiang (Orienta Turkeŝtano, regiono de ujguroj) kie miliono da ujguroj „malliberigite loghas“, oni produktis en deviga laboro grandan kvanton de la eksportitaj fotovoltaj paneloj, kiuj estis venditaj al UK.

(laŭ Greenpeace, 2021-04-30)

= =

2021-04-07 protekti tutan Europon kontraŭ influo de Ordo Iuris

Pollando nomumis la polan jughiston Aleksander Stępkowski kiel kandidato por la Europa Kortumo pri Homaj Rajtoj (EKHR).

Tio signifus baton kontraŭ la Homaj Rajtoj de virinoj mem decidi pri nasko aŭ abortigo, kaj neglekton de Homaj Rajtoj de seksaj minoritatoj, t.n. LGBT+ . Li apartenas al Ordo Iuris, CSO kiu havas filiojn en pluraj EU-shtatoj.

Chiu lando rajtas proponi 3 kandidatojn. WeMove (ni movas) petas subteni la peticion al EKHR ke tiu kandidato ne estas akceptebla. Je la 9a de Aprilo okazas pridemandado kaj akcepto - aŭ malakcepto - de kandidatoj.

Bonvolu legi pri la detaloj en unu el chi-tiuj lingvoj - kaj subtenu la peticion.

<https://you.wemove.eu/campaigns/europe-reject-a-fundamentalist-protect-our-rights>

<https://you.wemove.eu/campaigns/proteger-europe-fondamentalisme>

<https://you.wemove.eu/campaigns/rechaza-fundamentalismo>

<https://you.wemove.eu/campaigns/europa-allontana-fondamentalismo>

<https://you.wemove.eu/campaigns/ordo-iuris-etpc>

<https://you.wemove.eu/campaigns/europa-wehre-dich-gegen-fundamentalismus>

= =

2021-04 en la Aprila numero 2021 de "Esperanto" pagho 81 + 82 aperis mia recenzo pri tiu eminenta libro. Pri tiu mi jam skribis je la 15a de Februaro.

La sola ŝanĝo kion mi devis fari estis - ne menci iun konkretan ŝtaton (P.R. Chinio) pro la neutraleco de UEA.

Mi anstataŭis chi-tiun alineon per tiuj du frazoj:

" Tiu libro gravas ankaŭ hodiaŭ, ĉar en multaj landoj estas tendenco al totalismo. Se la gazetaro kaj televido estas en la manoj de reganta reĝimo, jam malfacilas informiĝi objektivite pri politiko."

Intertempe mi kontaktis la sekretariinon de la koncerna eldonejo, kiu informis ke ghi ne plu ekzistas, kaj ke ne plu estas stoko de tiu libro.

= =

2021-03-22 La Bharato de Narendra Modi

Tamen la aktuala ĉefministro Modi celas krei pure hindan ŝtaton.

La nova legho ke rifughintoj pro religio rapide rajtas igi civitano de Bharato/Hindio (ankau Barato) se ili ne estas islamanoj montras la malamon kontraŭ tiu religio.

Hindio estas ne-perfekta demokratio - laŭ tiu indekso (malaktuala versio en Esperanto):

https://eo.wikipedia.org/wiki/Demokratio_indekso

Hindio havas tre longan historion, kaj ghis nun ne forgesis la konkeron flanke de islamaj Mogul-regantoj antaŭ ch. 1.200 jaroj. Tipa agado nuntempe estis la detruo de islama templo en Ayodhya kaj konstruo de hinda samloke. Ĉar oni diris ke tiu Babri-Moskeo estis konstruita sur loko de iama templo por la hinda dio Rama (kiu laŭdire naskiĝis tie antaŭ 900.000 jaroj) - pro tio okazis pogromoj.

Tiu raporto montras la evoluon de Modi al naciisma politikisto. Unuflanke li sin-prezentas pacema, konsciencema, afabla homo; aliflanke lia ministro de interna politiko agas perforte.

La filmo estas videbla nur ghis la 7a de Aprilo; parolo en la franca aŭ germana, subtitolita ankaŭ en la anglan, hispanan, italan kaj polan:

<https://www.arte.tv/fr/videos/091090-000-A/la-nouvelle-puissance-indienne-le-monde-selon-modi/>

= =

2021-03-21 Internacia Tago kontraŭ Rasismo
Bonvolu legi detale en la 6 lingvoj de UN:

<https://www.un.org/en/observances/end-racism-day>

Ni esperantistoj scias ke la gefiloj de L.L. Zamenhof estis mortigitaj de la naziista 3-a Germana Regno pro rasisma ideologio.

Tio estas temo ekzemple en la libroj de Ulrich Lins, „La danghera lingvo“, kaj de Roman Dobrzynski, „Zamenhof en Varsovio“.

Homoj suferas pri diversaj formoj de rasismo en diversaj partoj de la mondo, en Usono oni klopodas redukti la rasismon de blankuloj kontraŭ nigruloj. En P.R.Chinio la registaro subpremas la grandajn minoritatojn: tibetanoj kaj ujuguroj, krome decidis en 2020 ne plu instrui la mongolan en bazaj lernejoj de la t.n. Interna Mongolio. Temas pri registara kultura rasismo, ĉar lingvo estas bazo de la propra kulturo. K.t.p.

https://eo.wikipedia.org/wiki/Interna_Mongolio#Lingvoj_kaj_kulturo

= =

2021-02 Manifestacii kontraŭ registaro eblas nur en demokratiaj landoj.

En Rusio, Chinio, Birmo, Norda Koreio protesti estas danghera; en Birmo, ktp ech viv-danghera. Jen duon-hora raporto pri la semajnaj manifestacioj en Moskvo kaj aliaj urboj antaŭ la malliberigo de A. Nawalny; en la germana kaj franca, krome videbla subtitolite en la pola, k.a.:

<https://www.arte.tv/fr/videos/100300-094-A/arte-regards-contre-poutine/>

Kaj jen foto de la palaco de la prezidento je la bordo de Nigra Maro.

<https://www.stern.de/politik/ausland/wladimir-putins-palast-der-superlative---wie-ein-neues-versailles-30006694.html>

Komento de AVE/mw - pri Rusio:

Kompreneble prezidento rajtas uzi shtatajn kastelojn por loghi dum la vojaghoj tra tiom granda lando. Sed ĉi-kaze temas pri afero, kiun li prefere kashas antaŭ siaj kun-civitanoj; se mi bone komprenas estas lia privata(j) kastelo(j) (?) Oni ne scias kiom richa li estas.

La problemo de Germanio (de Europo, kaj ankau de Usono) estas ke ni volas kaj devas kunlabori kaj intershanghi kun Rusio pro reciproka subteno/profito: tergazo, kosma kunlaboro, specialaj nutrajhoj, automobiloj k.a. mashinoj, turismo (indus).

Aliflanke ni ne volas ke Usono preskribas kion ni rajtas komerci kun Rusio (tergazo). Samtempe ni (kaj la Europa Jur-kortumo) defendas la Homajn - kaj civitanajn - Rajtojn de la homoj en tia europa lando. Multe pli ne eblas fari - krom atendi.

= =

2021-03-16 Rusio malliberigas konferencon de Unuighintaj Demokratoj

La Forumo en Moskvo temis pri subteni konkurencivaj elektadoj en Rusio de urba nivelo. La organizintoj celis krei platformon kie aktuale oficantaj urbaj deputitoj el pli ol 50 Rusaj regionoj povus interŝanĝi spertojn. Partoprenis 193 homoj, inter ili Yevgeny Roizman, iama urbestro de Ekaterinburgo. La forumo estis subtenita de M. Khodorkovsky, kiu estas en ekzilo.

(fonto: <https://khodorkovsky.com/attempts-to-intimidate-us-wont-work-entire-municipal-russia-forum-detained/>)

--

2021-03-11 P.R.Chinio ne respektas la autonomion de Hongkong

Okaze de la kontrakto de 1984 Hongkong havas la rajton de autonomio. Sed la registaro delonge ne plu respektas tion. Nun la Popola Kongreso en Pekino decidis shanghon de la elketo-legho de Hongkongo. <https://de.wikipedia.org/wiki/Hongkong#Autonomiestatus>

2021-01-06 la china registaro malliberigas 47 parlamentanojn de la parlamento de Hongkong

https://de.wikipedia.org/wiki/Proteste_in_Hongkong_2019/2020#Weiterer_Verlauf_ab_2021_%E2%80%93_politische_Folgen

Komento AVE/mw: mi ne komprenas kial tiom forta ekonomia lando ne povas respekti ech la kontraktojn (de 1984 kun GB). Ghi ighas pli kaj pli fashismeca, ĉar subfosas civitanan opozicion, krome malrespektas kulturan vivon de minoritatoj - escepto estas la prezento de bunta popola kulturo por turistoj. Krome la China Imperio etendas sian potencon al eksterlandaj terenoj - ekzemple en la libera parto de la maro (konstruante insulojn).

--

2021-02-16 Nova parlamento de Kosovo

La 14an de februaro, en Kosovo, (13 jara sendependiĝo), okazis eksterordinaraj ĝeneralaj balotoj. Kiel estis atendite, la partio Vetvendosje – Memdecido, estrata de Ing. Albin Kurti venkis ĉirkaŭ 48 % de la voĉdonoj aŭ pli ol entute ĉiuj kvar partioj postsekvantajn ĝin (Partia Demokratike - Demokratia Partio, Lëvizja Demokratike - Demokratia Movado, Aleanca për Ardhmërtinë - Alianco por la Futuro kaj Nisma - La Iniciato).

La malnovaj partioj, LDK, PDK estis jam provitaj kaj malsukcesaj, dum VV de Albin Kurti vekas esperojn ĉe la popolo de la plej nova ŝtato de Eŭropo, sed ankoraŭ malriĉa. La defioj por la nova registaro estas grandaj (senlaboreco, korupteco, elmigrado, dialogo kun Serbio, integriĝo en EU). Albin Kurti, eksa enprizonigito en Serbio en 1999, liberigita post pli ol unu jaro, pro la premo de internacia opinio, nekonformema al ĉiuj ĝisnunaj registaroj kaj internaciuloj en siaj klopodoj por suvereneco de Kosovo, promesas entrepreni ĉion eblan por mildigi la enlandan senlaborecon, ŝtopigi la elmigradon, plivastigi la internacian agnoskon de Kosovo, evoluigi ekonomion kaj batali ŝtatan koruptecon.

Lin subtenas la deĵoranta prezidentino s-ino Vjosa Osmani, same reprezentanto de la aspiroj de juna generacio de Kosovo.

(lau Bardhyl Adem Selimi, 16/02/2021)

= =

2021-02-015 Chinio torturas - en Tibeto kaj Orienta Turkestano, kaj malpermesas manifestacii en Hongkongo

En Tibeto la 19-jara monahho Tenzin Nyima estis tiom torturita ke li (en Oktobro falis en komaon, tiam forsendita kaj finfine mortis hejme); aliaj junaj monahhoj estis punitaj al plurjara malliberejo. Ili manifestaciis por la sendependeco de Tibeto.

www.tibet-initiative.de

UK protestis kontraŭ la sistema malliberigo en Orienta Turkestano, kiu celas lavi la cerbojn de la homoj (temas pri miliono); krome la registaro sekvas geocidan vojon ĉar sen-fekundigas ujugurajn virinojn. Ankaŭ en la angla: <https://www.gfbv.de/de/informieren/laender-regionen-und-voelker/voelker/uiguren/>

2021-02-09 La Fashismo - analizo pri totalismaj reghimoj - de Jhelu Jhelev

li finverkis ĝin 1967 - unua publikigo en Bulgario sukcesis nur 1982 (pli frue li ne sukcesis „pro manko da papero“), sed la libro estis tuj malpermesita;

denove eldonita 1990, kaj jen la traduko en Esperanto (de Nikolao Stranghanski, red. kaj korektita de 4 personoj) en 1992 de Pres-Esperanto, Sofio. Li tre bone analizas la jenajn historiajn fashismojn: Hispanio, Italio kaj Germanio. Postparolo (1990) diskutas ankaŭ kiomgrada la Socialismaj ŝtatoj montris fashismajn trajtojn. Nuntempe estas tendencoj en pluraj ŝtatoj; dum ekzistas liberaj amasmedioj fashismo de eblas.

Jhelev ighis la unua prezidento de Bulgario post la socialisma tempo.

La libro en formato A5 havas 349 paghojn, 181 literatur-fontojn.

Se iu de vi konas la eldonejon - bonvolu informi min.

(venis la informo, ke la libroj restis ĉe la Esperanto asocio; restantaj libroj pereis pro inundo)

2021-02-09 la lasta libera radio-stacio en Hungario ...

KlubRadio estis la plej lasta, sendepende de la Orban-registaro, radio-stacio en Hungario. Nun ili ne plu rajtas elsendi.

Daniel Freund, MEP de Verduloj, vizitis ili en Oktobro; jen la filmeto:

<https://www.arte.tv/de/videos/099755-000-A/hallo-diktator/>